I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 11 - 12 Novembro kaj Decembro 1961 11-a Jaro

## COMUNICATO

Col 10° Congresso Nazionale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" tenutosi il 4 novembre 1961 a Bologna, si è aperto il nuovo anno finanziario 1961-62.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il bollettino di versamento nel Conto Corrente Postale n° 8/24094 intestato alla "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" I.F.E.A. Via Donato Creti n° 61 - Bologna (131).

In conseguenza delle decisioni prese durante il Congresso di Bologna, le quote sociali per l'anno 1962 sono le seguenti:

- Associazione alla I.F.E.A., alla I.F.E.F., alla U.E.A., ed alla F.E.I., con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 1500,- annue.
- Associazione solamente alla I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 800,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1961, e che continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote per l'anno 1961 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti (U.E.A., I.F.E.F., e F.E.I.) oppure trasmettere le loro dimissioni per non dovere pagare le loro quote anche per l'anno 1962 alle suddette Associazioni.

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, la estraro de itala FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO", FRATE BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

Ni sendas KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

## FERVOJISTOJ ESPERANTISTOJ EN BOLOGNA POR KONGRESI

Ĉe la postlabore ja fervojista klubo "Dopolavoro Ferroviario" okazis, la kvaran de novembro, la deka nacia kongreso de italaj fervojistoj esperantistoj. Ĉeestis la reprezentanto de la esperantaj grupoj fervojistaj de multnombraj italaj urboj.

Post kelkaj salutvortoj de la Prezidanto de la postlaboreja departementa klubo, Sinjoro Grazia, kiu bondeziris la uzadon de la lingvo Esperanto en ĉiuj rilatoj, la Prezidanto de I.F.E.A. "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" Kav. Zacconi legis la bondezirleterojn de Asocioj de Francujo, Aŭstrio, Svislando kaj Jugoslavio, de la fervojistoj de Orienta Germanujo, de Itala Instituto de Esperanto, kaj de pluraj altrangaj personoj en kultura movado. Ankaŭ Inĝ. Robert, Departementa Direktoro de Ŝtata Fervojo sendis leteron gratulantan kaj bondezirantan, senkulpigante sian neĉeeston pro deĵoraj kaŭzoj.

Post mallonga financa raporto de S-ro Gimelli, sekretario de italaj fervojistoj esperantistoj oni pritraktis diversajn problemojn pri organizado. Je la fino de la debato, oni informis la kunvenintojn pri agrabla novaĵo: ke nun ekstaras en Romo""Esperanta Domo" dotita per biblioteko. Tuj post oni aprobis proponon, sendotan al koncernaj Aŭtoritatoj, kiu certigante la gravecon de la internacia lingvo en ĉiuj rilatoj inter la fervojistoj de la tuta mondo, bedaŭras la nesufiĉecon de la helpoj ĝis nun ricevitaj de la centra organizo

de la Ŝtata Fervojo kaj deziras la rekonon de I.F.E.A. kiel okazis en multaj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj.

Fine la kunvenintoj delegis la Prezidantan konsilantaron kontaktiĝi kun la kompetentaj Instancoj de la Ŝtataj Fervojoj por ricevi la necesajn helpojn kaj enkonduki ĉiam pli en la fervojista medio, la konon kaj la uzadon de la Internacia lingvo.

## NI FUNEBRAS

**LA MORTO DE ANTTI RUHANAINEN**

En "La Internacia Fervojisto" ni legis la komunikon ke la 6-an de aŭgusto 1961 mortis en Helsinki, en la aĝo de preskaŭ 68 jaroj, nia bona finnlanda amiko ANTTI RUHANAINEN.

Certe ankaŭ multaj niaj membroj konis tiun karakterizan reprezentanton de norda lando: silentema, li ne uzis pli da vortoj ol ke li bezonis, sed ĉiam fidela al nia celo, ĉiam laborema por atingi la celon, kaj speciale tre fidela amiko. Li vizitis multajn I.F.E.F.-kongresojn, malgraŭ la granda distanco de sia hejmlando.

Kiel fidela partoprenanto al ĉiuj niaj ĉiujaraj eventoj, li ja revis pri la momento, kiam li povos akcepti la kongreson en propra urbo. Ni, kiuj funebras pro la perdo de ĉi tiu senkomplika amiko, elkore ĝojas ke Antti ĝisvivis ĉi tiun, eble plej feliĉan epizodon de sia vivo. Kun brilaj okuloj li akceptis tie la honoran medalon de la urbo Parizo el la mano de S-ro Marcel Mellion.

Lastan fojon ni vidis lin, vigla kaj agema, kiel la aktivan sekretaron de nia 12-a kongreso en Helsinki. Nelacigeble li agadis por kompleze plenumi ĉiujn dezirojn de la vizitantoj al lia kongreso. Li estis la obstina laboranto, kiu kontribuis tiom grandan parton por la brila sukceso de la kongreso en Finnlando.

Konata kaj amata persono el nia internacia rondo forpasis; estis grava bato por I.F.E.F. sed speciale por niaj finnaj amikoj. Ni klinas la kapon antaŭ la sorto, kiu forprenis el niaj vicoj meritoplenan kaj honestan amikon.

Ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn al la familianoj kaj al la finna esperanto movado.

**KIAMANIERE KONI LA FUNGOJN?** Jus aperinta libreto por la praktika rekono de ĉirkaŭ 150 kvalitoj de fungoj (makromicetoj), celante precipe la rekonon de la malmultegaj mortigaj specoj. 40 paĝoj kun 22 skemaj desegnoj en tri tabeloj. La prezo de la libro estas 10 steloj, inkluzive de la sendkosto, ĉe Inĝeniero Mario Simondetti, Via Staurenghi, 24 Varese Italia.

**ESPERANTO DOMO EN ROMO.** La 9-an de novembro oni inaŭguris en Romo (Via del Boccaccio 5 apud place Barberini) Esperanto-Domo. Ĝi funkcias ĉiuvespere inter 18-22 horo. Pri ĝi respondecas nia rumana samideanino S-ino Ĝisela ĝiĝi HARABAGIU. La Esperanto-Domo kore invitas ĉiujn italaj kaj alilandaj geesperantistoj. Ĉiuj estos ĉiam kore akceptotaj.

**DEZIRAS KORESPONDI:**

- Kun itala fraŭlino: S-ro IVAN GANĈEV KOLEV - Str. "Iurii Venelin" 1° GABROVO (Bulgario)
- S-ro KIRIL DAĈKOV- Str. "Kiril kaj Metodij" n° 70 VARNA (Bulgario)
- D-ino DANKA (Jordanka) M. SIRAKOVA - Str. "Jane Sandonski" N°14 VARNA (Bulgario)

## ESPERANTO EN LA RADIO

**RADIO ROMA - Esperanto Fako** - Casella Postale 320 ROMA (Italujo)

La dissendoj okazas de la 18,55 ĝis la 19,10 h. (M.E.T.). Ondlongoj: 30,90; 41,24; 50,24

DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1962-a - Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.

JANUARO 1962-a - Mardon la 2-an: Tra la literaturo - vendredon la 5-an: Epifanio - mardon la 9-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 12-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 19-an: Tra Romo: Koloseo kaj Domus Aurea - mardon la 23-an: Italaj belartaj urboj: Cosenza - vendredon la 26-an: Italujo kaj fremdaj komponistoj: R. Wagner - mardon la 30-an: Italaj turismaj urboj: Lecce.

La Fakestro: L. MINNAJA

**HUGO STEINER 50 JAROJN ESPERANTISTO.** Antaŭ nelonge festis S-ro kortega konsilanto Hugo Steiner, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, sian 50-jaran jubileon kiel esperantisto. Al la meritplena veterano kaj orjubileulo de nia movado ni prezentas postfeste niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.